

& Jununjo staris kaj verŝis akvon:

< Ripete 48 el 96 batoj por strofo, entute 768 paŝoj dum 8 minutoj. Norda Kantaro #4162. El sveda tradukis Kukoletto (1993) strofojn '1-2 kaj Martin Strid (2016) strofojn '3-8. Klarigoj (*): '3 Estas subkomprenate ke la renkonto okazas dum vintro, kiam rozoj ne kreskas. '5 La iranton: sian ĉevalon.>

(#Melodio:

<1,8:3> (

(So /La a So /La La So /do o Tilre /do do; mi /so o fa /mi lre do /re e lmi /do o;)×

(mi /mi mi mi /so so mi /mi ilre La /re e; do /mi lre do /So La Ti /do o lTi /La a;)×

)×7)+

(&Strofoj:

'1 (Ju/nunjo /staris kaj /verŝi2s /akvon ;
el /puto /la2 mal/va2rma ;)× (Kaj /venis
raj/dante /ju2nu/luĉ' ; sa/lutis
ju/nu2njon /ĉa2r/man ;)×

'2 "Jununjo bela, jununjo ĉarma ; vi
staras kial sola jen? Ĉu volas vi esti
mia amat' ; kaj sekvi min
transsablejen?"

'3 "Vian kore karan mi volas esti ;
venigu al mi tri rozojn kiuj en ĉi
jaro kreskis* kaj ; sur propraj radikoj
ripozas."

'4 Fraŭl' rajdas montojn kaj
valprofundon ; sed roz' nenie ekzistas
..... Rajdas li antaŭ pentrista pord' ; kaj
ene estis pentristo.

'5 "Se estas vi ene, elvenu vi ; kaj
penu por mi tri rozojn kiuj en ĉi
jaro kreskus kaj ; sur propraj radikoj
ripozus."

'6 La fraŭlo kiam la rozojn ricevis ; la
iranton* lasis li kuri "Ĝoju vi, ĝoju
vi, bela jununjo ; jen mi la rozojn
akiris."

'7 Kiam jununjo la rozojn ekvidis ;
komencis ŝi ĝenĝemi "Mi diris la
vortojn kiel blagon ; mi ne kredis ke vi
ĝin celos."

'8 "Se tion diris vi por blag' ; mi prenas
ĝin por blago Mi estas via kaj vi
estos mia ; en ĉiuj niaj vivtagoj."